
N-ro 2 - 2015

MARTINUS INSTITUT

# Kosmos

## LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS



© Martinus Institut 1981 Reg. 96

**Martinus:**
Tra la morto 3. Polusevoluoj kaj la spiritaj sferoj. Simbolo n-ro. 96

**Martinus:**
Tra purgatorio kaj paradizo – 1

**Martinus:**
Tra purgatorio kaj paradizo – 2, la partoj 5-16

**Javier Romero:**
La Centa Universala Kongreso de Esperanto kaj la Kosmologio de Martinus

Esperanto

# ENKONDUKO

**Kara leganto,**
en tiu ĉi numero vi povas legi plurajn tekstojn de Martinus pri la morto, aŭ pli precize, pri kio okazas post la morto. Sur la kovrilpaĝo videblas la simbolo ”Tra la morto 3. Polusevoluoj kaj la spiritaj sferoj”. Tiun simbolon Martinus ne priskribis tekste, sed li en pluraj prelegoj klarigis ĝin, pro tio tiu teksto enhavas multajn ripetojn, sed ĝi donas tre bonan bildon pri la postmortaj mondoj. Por havi eĉ pli da kompreno pri ili ni enmetis tekstojn kiuj priskribas kio okazis postmorte al kvin personoj el la Biblio, nome Jesuo, Johano, Judaso kaj la du rabistoj kiuj estis krucumitaj apud Jesuo.

Do, tiu ĉi numero enhavas multajn gravajn informojn pri la vivo post nia fizika vivo! Sed ĉu ili vere estas fidindaj kaj ĝustaj? Kiel Martinus povis ekzemple scii kio okazis post la morto de Judaso? Ĉu entute ekzistas vivo post la morto? Se jes, kiel Martinus povis scii tiom multe pri ĝi? Malfacilas doni certoplenajn respondojn al tiuj demandoj, ja malfacilas por ni terhomoj certi pri io ajn kio por ni ne estas observebla per niaj sensoj aŭ fizikaj mezuriloj. La postmortaj demandoj kerne temas pri nia konsisto, alivorte pri nia interna kerno. En siaj libroj Martinus detale trairas nian psikan stukturon kiu ekzistas ”malantaŭ” nia fizika apero. Sed laŭ liaj analizoj fakte ne ĝi estas nia plej profunda interno. Nia psika strukturo, nia konscio aŭ nia animo estas ligita al io eĉ pli profunda, nome nia ”superkonscio” kiu konsistas el nia mio kaj nia kreo-sperto-kapablo kiu enhavas i.a. multegajn talentokernojn. Estas danke al tiu ĉi ”superkonscio” aŭ ”la viva en la viva estulo” ke ni ekzistas kaj vivas, alterne en la fizika mondo kaj en la spirita sfero. Pro tio ke nia ”superkonscio” estas eterna kaj ke ĉiuj niaj trajtoj kaj kapabloj transvivas en ties talentokernoj, ni povas iom post iom evolui el besta stadio, al duonbesta-duonhoma stadio (kie ni nun troviĝas) al tute homa stadio (kiun ni atingos post ankoraŭ pluraj vivoj aŭ enkarniĝoj en la fizika mondo).

Martinus jam atingis la tuthoman stadion dum antaŭaj enkarniĝoj sur aliaj planedoj. Li jam evoluigis grandegan amokapablon kaj sekve ankaŭ grandegan intuicikapablon. Ĝuste per sia altevoluinta intuicio li havis konojn pri la leĝoj kaj principoj de la ne-fizika mondo. Martinus estis kvazaŭ gasto ĉi tie sur la tero kun la tasko klarigi la vivon per logikaj pensoĉenoj kaj tiel krei bazon por nova scienco, nome ”la spirita scienco”. Li ankaŭ klarigis multajn aferojn en la kristanismo el novaj vidpunktoj kaj pro tio li nomis sian verkon ”La tria testamento”. Tamen, ne temas pri religio, sed pri klaraj analizoj per kiuj interesiĝantoj povas ekhavi teorian komprenon pri multaj esencaj aferoj en la vivo. Tiu teoria kompreno kutime donas al la serioza leganto emon ŝanĝi sian pensadon kaj kondutmanieron. Nur per tute homaj pensoj kaj homaj agoj eblas atingi stadion en kiu oni vere komprenas la misteron de la vivo kaj kio okazas post la morto…

La numero ankaŭ enhavas du artikoletojn de Javier Romero Tello kiu estas aktiva pri Esperanto kaj la Kosmologio en i.a. Hispanio. En la venonta numero vi povos legi artikolon de Ole Therkelsen kiu klarigos pri la ĉi-jare noveldonita simbollibro, el kiu venas simbolo nr-o 96.

Agrablan legadon!

# Tra la morto 3. Polusevoluoj kaj la spiritaj sferoj

## Simbolo n-ro. 96

**96.1** La malsupra parto de la simbolo simbolas la fizikan sferon (oranĝa fonkoloro), kaj la supra parto simbolas la spiritan sferon. Sub la horizontala nigra kampo estas montrata sep apartaj estultipoj. La ovalaj figuroj simbolas la konscistrukturon de la estuloj. La ronda flava figuro simbolas la femalan poluson, kaj la verda simbolas la masklan poluson. Super la horizontala nigra kampo ni vidas la pozicion de la estuloj en la spirita mondo, ekde ili mortas, ĝis ili denove naskiĝas en la fizika sfero (la plej supra oranĝa kampo). Antaŭ ol ili naskiĝos denove, la estuloj trairu la diversajn kampojn en la supra parto de la simbolo, markitajn per la vertikalaj streketaj linioj. La kampoj estas tre malsamaj por la diversaj estuloj, kio ŝuldiĝas al la strukturo de la mensostatoj.

La unua el la sep ovalaj figuroj simbolu la beston aŭ la bestohomon, kiu havas multe da instinkto kaj pezenergio (ruĝ-oranĝa koloro). La estulo vivas ĉefe el instinkto kaj pezenergio, kaj pro tio instinkto kaj pezenergio ankaŭ ĉefrolas en ĝia vivo en la spirita sfero (ruĝ-oranĝa koloro). Ĝi spertos en sia konscistato la samon, kion ĝi spertas sur la tero, tamen ĉi tie la estulo ne ĉasu, ĉar ja temas pri stato kiu esence similas al sonĝado.1 Ĝi rapide trairos la pli altajn spiritajn sferojn, la homregnon, la saĝoregnon kaj la dian mondon kaj la beatoregnon (flava, verda, blua kaj indiga koloroj), ĉar ĉi tie ne estas multe por sperti. Tiaj estuloj ne havas la ondolongojn por tio. Tamen ili havas ondolongojn por sperti multegon en la instinkt-pezenergia kampo (ruĝ-oranĝa koloro). Kiam ĉi tiaj estuloj mortas, ili ne multe spertas purgatorion, sed pro tio ke ili ofte mortas nenature, ili estas devigataj ricevi helpon de la spirita sfero por povi trairi la purgatorion (grizbruna koloro).

La dua ovala figuro simbolas naturhomon, kiu antaŭeniris iom pli ol la plej malaltnivela homo, la bestohomo aŭ simihomo, kiu preskaŭ estas besto. La naturhomo estas iom pli evoluinta, ĝi havas iom pli da sento kaj iomete da inteligento. Ĝi komencas havi iom da purgatorio post la morto (grizbruna kampo), kaj ĝi daŭre havas grandan kampon kune kun la besto (ruĝa kaj oranĝa kampo). La naturhomo ĉasas, mortigas, militas ktp, kaj tion ni ankaŭ vidas en ĝia konscio.1 Ni vidas, ke la kampoj en la spiritaj sferoj supre kongruas kun la enhavo de la konscistrukturo en la fizika sfero.


La tria ovala figuro simbolas la kutiman religian homon de nia tempo. Ni vidas, ke venis multe da sento, ke la

inteligento evoluis, kaj ke estas iom da intuicio, kiu montriĝas supre per blua koloro. La intuicio ne estas montrita en la konscistrukturo en la ovala figuro, ĉar la estulo daŭre enhavas multe da pezenergio kaj instinkto. Sed ĝi havas la religian kredon, do la komenciĝantan humanan kredon, kiu estas montrita per la flava koloro. Ni vidas, ke ĝi ankaŭ havas iom da inteligento (verda koloro). La du violkoloraj kampoj simbolas la superkonscion, kiu portas la eternan ekziston de la estulo. La sortoelemento kaj la talentokernoj povas en la super-konscio transvivi la pereon de la korpo. Depende de la konscienhavo, la religia homo ricevas sian apartan restadon en la spirita sfero. Ĝi do ricevas certan tempon en la unua sfero, kie ĝi spertos ian paradizon laŭ la konceptoj, kiujn ĝi akiris sur la tero, kaj laŭ la sento, kiun ĝi ankaŭ iom havas. Tia sento en ligo kun inteligento donas humanan religian staton, kaj la estulo sekve praktikas humanan religion. Se temas pri kristanoj, ili povus sperti "la grandan blankan gregon" kaj similajn humanajn paradizecajn statojn.1 Krom ĉi tiuj statoj ili spertos ankaŭ aferojn, kiujn ili ne konas. Ili iĝos protektanĝeloj kaj havos eblon helpi.

La kvara ovala figuro simbolas la materiiston, kiu havas multe da inteligento, markita per verda koloro. Estas iom da intuicio, estas sento kaj ankaŭ ne malmulte da besteca energio. Homoj el tiu ĉi tipo povas esti komercistoj aŭ inĝenieroj. En la spirita sfero ili spertos kampojn kiuj kongruas kun ilia konscistrukturo. La inteligento kaj la sento, kiuj fariĝis ilia kutimstato, kondiĉigas kiom longe ili estos en la diversaj spiritaj regnoj, kiuj videblas super la horizontala nigra streko. Unue ni vidas la purgatorion (grizbruna koloro) kaj poste la unuan sferon (ruĝ-oranĝa koloro)3, sekve la veran homregnon (flava koloro) kaj la saĝoregnon (verda koloro). La grandeco de la verda koloro montras, ke homo de tiu ĉi tipo povas esti longe en la saĝomondo, ĉar ĝi estas tre materieca kaj laboras multe per nur inteligento. Sed nun temas nur pri unu baztipo, ja ekzistas nemezureble multaj aliaj tipoj. Sur la simbolo estas montritaj nur kelkaj baztipoj, el kiuj oni povas krei imagon pri la aliaj tipoj.

La kvina ovala figuro simbolu la geniulon. Ni vidas, ke ĝi havas komenciĝantan fortan intuicion en sia konscio kaj multe da inteligento kaj sento. Ĝi estas en ekvilibro. Tio ankaŭ signifas, ke ĝi estas tre amema estulo. Ni vidas ke ĝi havas iom da pezenergio kaj iom da instinkto en si. Povas temi pri artisto, geniulo en diversaj kampoj, sed ĝia konscio estas tre harmonia. Ni vidas, kiel la antaŭe tre domina femala poluso malkrekas, kaj kiel la maskla poluso kreskas. De stato en kiu la polusoj estis tre kontraŭaj, ili transformas sin direkte al ekvilibro.

La sesa ovala figuro simbolas estulon, kiu komencas ekhavi kosmajn ekbriletojn, estulon kiu estas tre tre psika. Ne ekzistas multaj tiaj estuloj, sed estas tiuj ĉi estuloj kiuj iĝas grandaj verkistoj, spiritaj mastroj kaj kiel oni nun nomas ilin. Do, estas ĉi tiaj homoj kiuj abundetas en la Oriento. Ni vidas, ke ili en ilia konscistrukturo havas multe da intuicio (blua koloro). Ili havis kosmajn ekbriletojn. La du dikaj horizontalaj strekoj supre kaj malsupre en la ovala figuro markas la limon al la regiono de la superkonscio. Kiam la intuicio en la sesa ovala figuro parte troviĝas super la dika streko supre, tio signifas, ke tiu



© Martinus Institut 1981

Simbolo n-ro. 96

*Tra la morto 3. Polusevoluoj kaj la spiritaj sferoj*

ĉi estulo ekhavas kosman konscion. Sub la ekvivalenta streko malsupre ankaŭ estas intuicio. Inteligento kaj sento estas en ekvilibro, kio signifas amon. Ĝia pezenergio estas tre malgranda. Tia estulo neniam povas koleriĝi aŭ ekesti atakema aŭ malbeni aliajn aŭ simile. Ĝi estas tute pura.

La sepa ovala figuro simbolu estulon, kiu atingis la perfektan staton. Ĝi havas kosman konscion, kaj ni vidas, ke eĉ pli granda regiono en la superkonscio estas kovrita de la intuicio. Tie estas tre granda kampo kun intuicio. Ĝi do havas plenan kosman konscion, kaj ĝia restado en la unua sfero de la spirita mondo fariĝas tre tre mallonga. Kompense ĝi ricevas longan restadon en la spiritaj sferoj kiuj kongruas kun ĝiaj interesoj, ĝia konscio kaj ĝiaj ondolongoj.

La beatan regnon (indiga koloro) ni ĉiuj trairu por povi denove naskiĝi en la fizika mondo, kiu estas indikita per oranĝa koloro plej supre sur la simbolo.

*De la prelego "Tra la morto 2", 1958-05-28*

96.2 La ovalaj figuroj plej malsupre sur la simbolo montras la beston, la perfektan homon kaj ĉiujn stadiojn inter ili. Maldekstre ni havas la beston kaj la primitivan naturhomon, kaj ni vidas, ke ne estas granda diferenco inter ili, sed la naturhomo tamen havas iom pli da sento. La sekva estulo estas la moderna religia homo, la kredanto, kiu kredas religie kaj ne havas intelektan sintenon. La sekva tipo estas la pli inteligenta, la pli komerceca homo, la materiisto. La kvina figuro simbolas altintelektan estulon, ekzemple genian artiston kun enorma talento. Ni vidas, ke tie en ĝia konscio estas ekvilibro inter sento kaj inteligento, kio signifas, ke la intuicio ekaperas. Tia estulo povas verki aventuron, grandajn romanojn, teatropecojn ktp, pro tio ke ĝi havas la intuician sensokapablon. Ĝi ne havas multe da pezenergio, la malhela energio, kiu kreas malamon kaj amarecon. La sekva figuro simbolas homon kun granda kosma kapablo. Ĝi estas genio kaj spertis kosmajn ekbriletojn. Plej dekstre ni vidas la pretan homon aŭ la perfektan homon. Rilate al sia konscio, ĝi konsistas el tute pura intelekta energio.

La oranĝa koloro ĉirkaŭ la ovalaj figuroj simbolas, ke la diversaj estultipoj estas en la fizika sfero. La nigra horizontala streko super ili simbolas la morton aŭ la proceson, kiun ni nomas la morto. Kaj jen venas la spiritaj sferoj, kiujn la estulo trairu por denove naskiĝi en la fizika sfero, kiu estas simbolita per la plej supra oranĝa kampo.

Ni nun vidu kion ĉi tiuj estuloj spertos en la spirita sfero. La besto havas multe da instinkto kaj pezenergio en sia strukturo aŭ konscistato (figuro 1). Unue la besto trairos la purgatorion, kiun ĝi ne spertas tre multe (grizbruna koloro). La protektanĝeloj helpas la estulon en la purgatorio, kiu nur estas prepariĝo por la spirita sfero. Post la purgatorio ĝi ricevos grandan spiritan estadon en la sama ondolongo, kiun ĝia konscistrukturo havas, ĉar ja estas nenio alia, kio povus iĝi paradizo por la besto. En la spirita mondo ĝi estos plej longe en la instinktosfero. Ĝi iras latente tra la plej altajn sferojn: la spiritan regionon de la homregno (flava koloro), la saĝomondon (verda koloro) kaj la dian mondon (blua koloro). Ĝi ricevos pli longan estadon en la beatoregno (indiga koloro), kaj de tie ĝi naskiĝas denove al la fizika mondo (la plej supra oranĝa kampo). Ni do vidas, ke tiu ĉi besta estulo havos longan spiritan estadon,

kiu kongruas kun la estado kiun ĝi havas en la fizika sfero.

La sekva estulo estas la primitiva naturhomo (figuro 2), kiu trairu ion similan, sed ĝi havas iom pli grandan purgatorion. Ĝi ja komencas povi pensi kaj malkovri, ke ĝi agis malĝuste, kaj pro tio ĝi ricevas pli da purgatorio. Post tiu ĉi purgatorio ĝi spertos la instinkt- kaj pezenergisferon (ruĝ-oranĝa koloro). La paradizo, kiun tiaj estuloj imagas, similas al ĝia vivo en ĉiutaga fizika vivo. La pli altajn spiritajn sferojn, la homregnon, la saĝomondon kaj la dian mondon, ili spertas nur iomete, dum mallonga periodo. Sed tamen ili havas longan estadon en la spirita sfero, kiu estas en kontakto kun la unuaranga stato en ilia konscistrukturo (ruĝ-oranĝa koloro).

La sekva estultipo estas la religia aŭ kredanta estulo (figuro 3), kiu kredas je budhismo, je islamo aŭ je iu alia religio. Ni vidas, ke la religia homo havas multe da pezenergio kaj sento. Ili povas esti tre maltoleremaj, eĉ se ili estas kredantoj kaj kredas je unu dio. Kaj ni ankaŭ vidas, ke ili en ilia strukturo havas grandan nepretan regionon (ruĝ-oranĝa koloro). Ili krome havas sufiĉe grandan regionon de sento (flava koloro), kaj ili havas iom da inteligento (verda koloro). Ĉi tiuj talentoj estas decidaj, kian paradizon ili spertos post la morto. Ĉar ili havas pli grandan senton, ili ricevas sian paradizon en la vera homregno.1 Ili spertas ankaŭ estadon en la aliaj interesosferoj, kiujn ili adoris en la fizika sfero, sed ili sufiĉe latente aŭ rapide trairas la saĝoregnon kaj la dian mondon, por tiel veni al la beatoregno, de kie ili denove naskiĝu.

La sekva estulo montras la homon kun tre materia sinteno (figuro 4), kiu ne kredas je Dio aŭ je io alia. Ĝi havas sian intereson pri komercado, aŭ pri adori similajn materiajn manifestaĵojn, kaj ĝi ricevas spiritan estadon, kiu iom rilatas al tio ĉi. Ĝi havas sufiĉe grandan purgatorion, ĉar ĝi estas multe en la komerca mondo, kio povas doni al homoj purgatorion. La komerca mondo ja estas tre ofte kaŝita rabado kaj ŝtelado, sed kompreneble ekzistas esceptoj. Pro tio la purgatorio estas tre granda sur la kampoj, kie la materiismo kaj dioneado troviĝas. Sed ili havas bonan intelekton, kaj pro tio ĉi tiuj homoj ricevas eblon havi parte materian sperton de paradizo en la formo de komercaj travivaĵoj. Ili ankaŭ ricevas paradizon en la homregno danke al sia sentoevoluo. Ili ricevas pli longan restadon en la saĝomondo, ĉar ili estas tre inteligentaj. Pro tio ke ili ne havas tiom multe da intuicio, ili ricevas mallongan restadon en la dia mondo, antaŭ ol ili transiras al la beatoregno.

La sekva homtipo estas la geniulo (figuro 5), kiu evoluigis iom da intuicio.

La apuda figuro montras la estulon kun kosmaj ekbriletoj (figuro 6), kiu ricevas grandan kaj agrablegan estadon en la spirita sfero. En la ovala figuro ni vidas, ke estas tre tre malmulte de la mortiga energio (ruĝ-oranĝa koloro), de tio, kio igas, ke oni malamas kaj persekutas, estas enviema kaj estas ĵaluza. Pro tio la estulo spertos tre malmulte el tio ĉi en la unua sfero. Alieflanke ĝi spertos multegon en la pli altaj spiritaj sferoj. La estulo ja havas multe da sento kaj multe da inteligento, ĝi havas intuicion, ĝi havis kosmajn ekbriletojn, kio estas markita en la figuro per la blua koloro en la regiono de la superkonscio. Tia estulo ricevas longan tempon en la homregna regiono, en la saĝoregno kaj ankaŭ longan tempon en

la intuiciregiono, la dia mondo, por fine veni al la beatoregno, de kie ĝi denove naskiĝos.

Plej dekstre ni vidas la plene kosman estulon (figuro 7). Ĝi povas trairi tuj, ĝi ne havas iun purgatorion. Ĝi nur havas kutimtalentojn de la fizika mondo. Ekzistas latenta regiono (ruĝ-oranĝa koloro), kiu indikas limon al la pli altaj spiritaj mondoj. Post tiu ĉi regiono la estulo eniras la perfektan homregnon, la saĝoregnon kaj la dian mondon, kie ĝi havas longajn restadojn.

Ni do vidas la diferencon inter homoj maldekstre kiuj vivas en la idealoj de la mortiga principo kaj la homoj dekstre kiuj vivas en la idealoj de la amo, en la idealoj de la saĝo kaj la arto ktp.

*De la prelego "Post la morto", 1958-06-06*

96.3 La simbolo montras grandan parton de la mondplano, la dian mondordon, kiu ekestas danke al la polustransformiĝo.

La ovala figuro plej maldekstre simbolas estulon, en kiu la mala poluso estas tre malgranda kompare kun la ordinara. La kampo inter la du dikaj horizontalaj strekoj simbolas la konscion de la estulo. La granda ruĝ-oranĝa regiono signifas, ke ĝi multe vivas en la besteca kaj mortiga principo. Supre, super la horizontala nigra kampo, ni vidas ankaŭ ilustraĵon de la konscistato de tiu ĉi estulo. Krom la granda regiono, en kiu instinkto transiras al pezenergio aŭ la mortiga principo, nur estas malmulte da sento, kaj iomete da latenta inteligento kaj intuicio, sed tiuj ĉi energioj ne vere esprimiĝas. La instikt- kaj la pezenergio estas ĉiodomina en ĉi tiuj plej malaltaj kaj plej primitivaj homoj, kiuj aperas rekte el la bestostato, kaj kiuj formortis de la tero.

Sur la simbolo ni vidas, ke la polusoj pluevoluas. La mala poluso iĝas pli kaj pli granda, samtempe kun la malgrandiĝo de la mortiga principo. Tio estas simbolita per tio, ke la ruĝ-oranĝa regiono malgrandiĝas, kaj ke aperas pli da sento kaj inteligento. Iom post iom forpuŝiĝas ĉio malluma, tio kio kreas inferon, mortigon ktp.

En la mezo ni vidas estulon, en kiu la rilato inter la ordinara poluso kaj la mala poluso iom ŝanĝiĝis. La mortiga kaj besteca stato malgrandiĝis. Ni vidas kreskantan senton, kaj ĉi tie ĝi iĝis intelektigita, pro tio ke ankaŭ la inteligento kreskis. Ankaŭ estas komenco de intuicio, kiu poste donu al la homoj la pli altajn kosmajn konojn.

Plej dekstre ni vidas la dupolusan estulon, en kiu la polusoj estas samgrandaj kaj en ekvilibro. Ni vidas, ke estas granda diferenco inter tiu ĉi konscistato kaj la statoj plej maldekstre. Estas grandega regiono de amo, do intelektigita sento kaj humanigita inteligento. La estulo havas grandegan scion kaj grandegan intuicion, ĝi havas kosman konscion. Ĝi estas konscia en la pli altaj mondoj, same bone kiel ĝi estas konscia en la fizika mondo. Ĝi havas aliron al la sciomaro. La avantaĝo pri la polusa transformiĝo do estas, ke ĝi kondukas la estulon al tiu ĉi konscistrukturo. Estas prave, ke tiu ĉi polusa transformiĝo havas siajn terurajn naskdolorojn, kiam ĝi komencas ŝanĝi la homojn. Sed ja ankaŭ estas terura stato, kiun la intelekta flanko rezultigis tute ĝis la juĝotago. Nenio nova naskiĝas sendolore, oni diras, kaj tio validas ankaŭ ĉi tie. Sed poste ja venas enorma lumstato. Kia intelekteco! – Kia konscistato! – Ĉi tie la estulo ne estas ligita, ĝi povas materiigi kaj demateriigi sin. Ĝi

ne estas devigata esti naskita de virino, kaj ĝi ne dependas de virseksaj aŭ virinseksaj estuloj. Ĝi estas pli alta estulo, kiu en sia zono post la fizika stato povas materiigi sin kaj fari sin videbla por la homoj.

*De la prelego ”La plej alta fajro 2”, 1960-02-22*

96.4 La simbolo montras sep diversajn stadiojn, kiujn la homo trairas dum sia evoluvojo. La rondaj flava kaj verda figuroj simbolas la seksajn polusojn. La malsupra estas la plej malalta poluso, kaj la supra estas la plej alta poluso por la homo. Sur la simbolo la mala poluso estas markita per verda koloro. Ni vidas, ke tiu ĉi poluso kreskas, ĝis kiam la du polusoj iĝas egalnivelaj. Ni vidas samtempe, ke la mortiga kaj la besteca konscio malgrandiĝas, ke ekestas spaco por pli da sento, kaj ke la inteligento kreskas. Ni vidas, kiel la spiritkapabloj inteligento kaj sento iĝas intelektigitaj. Iĝas malpli kaj malpli de la mortiga principo, kaj finfine restas nur tiu pezenergio, kiu necesas, por ke la korpo entute povu ekzisti. Ni vidas kiel la intuicio aperas, kiam sento kaj inteligento ekhavas ekvilibron, kiam la sento iĝas intelektigita. Estas tiu ĉi intelektigita sento kiu estas amo.

En la kampo plej dekstre ni vidas la perfektan homon, kie apenaŭ estas pezenergio. Ni vidas spiritan strukturon, kie la sento dominas, la inteligento dominas kaj la intuicio dominas. Ĉio estas tre intelektigita per intuicio. Pro tio la perfekta homo ne plu bezonas naskiĝi en la fizika sfero.

En la kampo plej maldekstre ni vidas la bestecan homon aŭ la simihomon, en kiu estas grandega regiono kun ruĝa kaj oranĝa koloroj. Tiu ĉi estulo estas dominita de la pariĝa instinkto kaj la bestecaj tendencoj, do tio ĉi pri mortigi. Sed per la polusa evoluo ni vidas, kiel la besteca malgrandiĝas por tute malaperi ĉe la perfekta homo. Ĉi tie la pezenergio nur ekzistas por krei forton, sed aliflanke ekzistas multe da sento, inteligento kaj intuicio. La simbolo montras kia granda diferenco estas inter la unupolusa primitiva homo kaj la dupolusa homo. Tre gravas lerni ĉi tiujn aferojn, ĉar ili estas la solvo de la vivmistero.

*De la prelego ”La plej alta fajro 4”, 1960-03-07*

96.5 La simbolo montras sep evolustadiojn, kiuj ĉiuj estas markitaj per ovala figuro. Ni vidas ĉiujn interstadiojn inter la unupolusa estulo kaj la dupolusa estulo. Sub la horizontala nigra kampo ni vidas la fizikan sferon, kaj supre vidas ni la spiritan restadejon, kie la estulo troviĝas ekde la fizika morto, ĝis ĝi denove naskiĝas en la fizika sfero, kiu estas simbolita plej supre sur la simbolo (oranĝa koloro).

Super la horizontala nigra kampo ni vidas, kion la estulo spertas post la morto. La unua sfero estas en la realo destinita por prepari la estulojn por la spirita vivsfero, kie ĝi estu amema (flava, verda kaj blua koloroj). Por la bestoj tiu ĉi regiono estas tre malgranda, sed aliflanke la paradizo de la unua sfero estas tre granda (ruĝ-oranĝa koloro). Ne estas tiel granda diferenco inter kio la bestoj spertas en la spirita sfero kaj en la fizika sfero, ĉar en la fizika sfero ili fakte ankaŭ vivas en ilia paradizo.

La bestoj kaj la primitivaj homoj estas simbolitaj per la du figuroj plej maldekstre (figuro 1 kaj 2). Same kiel la bestoj la primitivaj homoj vivas en la mortigstato. Ili vivas kun la mortigstato

kiel idealo, kaj ricevas sian paradizon responde al ĝi. Dum plejparto el la tempo en la spirita sfero ĝi estas en la ruĝa kaj oranĝa kampo. La primitiva homo havas iomete da sento kaj inteligento, kiuj estas montritaj en la supra parto de la simbolo. Sed estas do nur tiom ke sufiĉas por ilia malgranda bezono.

La venonta figuro simbolas pli homan estulon (figuro 3). Ni vidas, ke kia la estulo estas, tiel ĝi havas sian spiritan estadon.

La simbolo montras, ke la mala poluso evoluas, ĝis kiam la du polusoj iĝos samgrandaj, kaj la homo iĝos dupolusa. Samtempe kun tiu ĉi polusevoluo la mallumo, la instinkto kaj la mortiga principo malgrandiĝas. Ni vidas, kiel la ruĝ-oranĝa regiono en la konscistrukturo malgrandiĝas pli kaj pli. En la venonta figuro tiu ĉi regiono preskaŭ malaperis kaj ne ludas rolon, kaj en la lasta figuro ĝi tute ne ekzistas.

Per la evoluo la estulo iĝas homa estulo (figuro 4), kiu komencas ekhavi humanan senton (flava koloro). Ankaŭ la inteligento komencas roli. La verda kampo montras, kiel la inteligento estas antaŭenirinta. Ĉe ĉi tiuj homoj la humana kapablo estas kreskinta, sed ili tamen havas sufiĉe multe da pezenergio kaj mortigan staton. Ili estas tre intelektaj kaj kreas armilojn kaj partoprenas en militado ktp. Ni vidas grizbrunan kampon en la ovala figuro, kaj super la horizontala nigra kampo ni vidas, kiel la preparstadio (grizbruna koloro) grandiĝis, pro tio ke tiuj ĉi estuloj origine estas edukitaj kaj trejnitaj laŭ humana religio. Sendepende ĉu estas en Ĉinujo, Hindujo aŭ Eŭropo, ili estas trejnitaj al humana aŭ kristana stato – oni estu humana, oni estu amema al sia ĉirkaŭaĵo ktp. Tio kaŭzas, ke estas tiu ĉi granda preparstadio, ĉar ilia baza sinteno ja estas humaneco, kristaneco kaj religia naturo, samtempe kun tio ke ili havas tiujn ĉi mortigkapablon kaj militkapablon. Tio faras, ke ili ricevas nur kelkajn malfacilaĵojn en la purgatorio tuj post la morto, sed ili estos helpataj el la mallumo. La mallumo foriru de ili. Eĉ se temas pri militestulo, grava militisto aŭ enorma genio en tiu ĉi kampo, ĝi tamen havas iun paradizon (ruĝa kaj oranĝa regiono). Sed tio ne sufiĉas por la estulo, ĉar ĝi ja ankaŭ estas humana, kaj ĝi havas grandan intelekton, pro tio ĝi ankaŭ havas estadon en la saĝoregno, kie ĝi ricevas grandan travivaĵon en ĝuste tia intelekteco.

Ni vidas, kiel ĝi plušanĝiĝas en la sekvaj figuroj (5, 6, kaj 7). Ĉi tie la diversaj konsciregionoj iĝos pli ekvilibraj, kaj la stadioj en la spirita mondo inter du fizikaj vivoj iĝos pli ekvilibraj. Ni vidas, kia granda diferenco estas inter la diversaj estuloj, depende de la konstelacio de iliaj konscistrukturoj. Dekstre ni atingas la tute humanajn kaj altintelektajn homojn, kiuj ne povas mortigi, ne povas murdi, ne partoprenas en buĉado de bestoj ktp. Ni vidas, ke ĉe ĉi tiuj pacoestuloj estas ekvilibro inter inteligento kaj sento, kaj ankaŭ estas intuicio. Ĉi tie ankaŭ estas pezenergio, sed nur aperanta laŭ la forto, kiun la estulo vere bezonas. Estas do tiuj ĉi estulstatoj, kiujn unu homo post alia atingos por fine iĝi plene perfekta homo, kiun ni vidas simbolita per la ovala figuro plej dekstre. Tiu ĉi kosma estulo, kiu estas en ekvilibro, estas nun preta pri la fizika sfero. Ĉi tie ne estas iu preparregiono, ĝi ja havas kosman konscion, ĉi tie ne estas iu purgatorio aŭ preparstato, la estulo transiras tuj al la pli altaj mondoj. Ĝi estas konscia en tiuj

ĉi mondoj jam en la fizika sfero, kaj ĝi transiras tuj al ĉi tiuj plej altaj mondoj. Ĉi tiuj paradizregionoj estas do amoregionoj (flava koloro), kaj ŝaĝoregionoj (verda koloro), kaj ĝi ankaŭ spertas la dian mondon (blua koloro). Tiel longe kiel ĝi enkarniĝas, ĝi havas tian restadon inter siaj fizikaj vivoj.

La simbolo montras, ke estas frapa diferenco inter la primitiva homo kaj la perfekta homo. La primitiva homo vivas mortigante, murdante ktp, tio estas ĝia idealo, tio estas ĝia paradizo. Sed se pli evoluintaj homoj ricevas tiajn travivaĵojn ili ja ne estas feliĉaj, kaj pro tio ili estas helpataj en tiuj ĉi stadioj, kiam ili mortas. Ili ricevas helpon, se ili mortas kun angorsentoj, se ili estas melankoliaj, estas malfeliĉaj aŭ havas vivenuon, ĉar ekzistas estuloj, kiuj volas helpi ilin. Kiam ili atingas tiun stadion, kiam ili sentas, ke ili bezonas helpon, la gardanĝeloj povas aperi, sed antaŭ tio ili ne aperu. Ili devas elkore deziri helpon, kaj tiam la gardanĝeloj povas forsugestii la mallumajn pensojn kaj ŝlosi la organojn, tra kiuj la mallumaj pensoj realiĝas, tiel ke la estulo tute ne povas realigi ion malluman. Se ĝi povus tion, ĝi ja ne povus atingi la pli altajn sferojn. Oni ja ne povas havi estulojn, kiuj murdas kaj mortigas supre en tiu ĉi paradizo. En ĉi tiuj sferoj restas al la estulo nur la spirita nivelo. Ekzitas io homa en ĉiu homo, kaj se la homa estas la paradizo por estulo, tiuokaze la besta devas mutiĝi.

En la pli alta spirita sfero la besta realigkapablo mutiĝas. Tio signifas, ke la homoj, kiuj estas ĝisostaj malamikoj, bone povas renkontiĝi en la pli altaj spiritaj sferoj, sed tie ili ne povas pensi malalte, tie ili ne plu povas pensi malame, murde aŭ mortige. Ili ne povas memori, ke ili estis malamikoj. Ilia konscio iom malgrandiĝis, sed aliflanke ĝi estas pure spirita, ĝi estas pure homa. Ne povas esti iu malamikeco en la pli altaj spiritaj sferoj, kie ĉio estas tute logika. Dekstre sur la simbolo ni vidas enorman humanregionon, enorman inteligentregionon kaj grandan intuiciregionon, kiuj estas ĝuste tiuj, kiuj mankas ĉe la estuloj en la stadioj maldekstre. Pro tio ili tute ne povas kunesti ĉi tie. Se tia estulo ne estus bremsita, se ĝiaj mallumaj talentoj ne estus forsugestiitaj, kaj iliaj ĉi-kampaj organoj estus haltigitaj, ili ne povus esti en la pli altaj sferoj.

*De la prelego ”La eterna vivo”, 1962-10-17*

96.6 La simbolo montru, kian vivon homoj ricevos en la spirita sfero post la morto. Sub la horizontala nigra kampo ni vidas la fizikan regionon, kaj de maldekstre dekstren ni vidas la evoluon de besto al homo.

Ni vidas, ke la homo havas du polusojn. La ronda flava figuro simbolas la femalan poluson, kaj la verda simbolas la masklan poluson. La evoluo faras, ke la du polusoj atingos ekvilibron. Kiam la polusoj estas ekvilibraj, la homo estas nek viro nek virino, li aŭ ŝi, tiam ĝi estas la bildo de Dio. Dio ne estas virino aŭ viro, Dio estas viva estulo. Oni povas diri ”vera homo”. La vera homo ja estas esprimo de Dio.

Ni vidas, ke la estuloj maldekstre havas multe da instinkto kaj iom da pezenergio. Ili havas nur iomete da sento, iomete da inteligento kaj iomete da memoro. Super la horizontala nigra kampo ni do vidas, ke ili ricevas analoge longan vivon en la instinktregiono, tio estas en primitiva regiono de la spirita sfero. Kiam ili atingas la pli

altajn sferojn, ili nur ricevas mallongan restadon en la vera homregno, kaj poste ili tre rapide revenas al la fizika sfero, pro tio ke ili ne havas aparte multe da inteligento kaj intuicio. En tiu ĉi maniero oni povas vidi aŭ konkludi, kia la spirita strukturo estas inter du fizikaj vivoj.

Ni vidas, ke la purgatorio estas plej granda por la estulo meze de la simbolo. Kiam la estulo poste pli kaj pli evoluos, la purgatorio malaperas. Se homo mortas, kiu estas perversulo aŭ drinkulo aŭ en alia maniero tendencas al ekscesoj aŭ devojiĝoj, ĝi devas resti en tiu ĉi sfero, ĝis kiam ĝi mem vokas helpon. Ne ĉiam estas tiel ke tia homo vokas helpon. Ne ĉiam estas tiel ke ĝi rimarkas, ke ĝi estas morta. Sed iam ĝi rimarkos, ke ĝi venis al alia sfero, ĉar tie estas neniu sunleviĝo, estas neniu sunsubiro. Tie estas eterna griza lumo, kaj la estulo renkontas nur similspecajn estulojn kiel sin mem. Ekzemple homo, kiu malamas, renkontos nur malamantajn homojn. Sed tio ĉi havas la avantaĝon, ke se temas pri homoj, kiuj estas bonkoraj kaj amantaj, ili ne havos tiel longan tempon en la purgatorio. Kiel ni vidas ili havas grandan regionon en la amoregiono, do la vera homregno. Ili havas grandan regionon en la saĝomondo kaj grandan regionon supre en la dia mondo, t.e. la intuicimondo.

La scienco ja estas serĉanta ĉi tiun intuicimondon nuntempe, kaj ĝi havas tiel fantastajn imagojn kaj enormajn hipotezojn pri la estonteco, sed multaj el ĉi tiuj tute devojiĝis. Sed tion oni pardonu la sciencistojn, ĉar ili ne komprenas, ke la intuicio estas kosma sensaro. Ne nur estas kapablo, sed ĝi estas kosma sensilaro. Estas tiu ĉi sensilaro, kiu kapabligis min doni tiun saĝon, kiun mi donis, sen legi ion, sen ajna studado en tiu ĉi mondo. Ĉio venis tra mi mem.

Estas do tiu ĉi intuicia kapablo, kiu estas alte evoluinta ĉe la estuloj plej dekstre sur la simbolo. Ĉi tie estas granda amemo, multe da inteligento kaj multe da intuicio. La figuro plej dekstre simbolas la pretan homon.

Ĉio ĉi estas io, kion oni mem studu, mi ne povas klarigi tion ĉi tie. Miatakse mi sukcesos tion ĉi klarigi en la du volumoj, kiuj restas de la simbollibroj, krom la kvara, pri kiu mi nun laboras. Estas io, kion oni studu kaj havu tempon eniri kaj kompreni. Sed ĉi tie mi nur volonte montros, ke estas tiuj ĉi temoj kaj tiuj ĉi simboloj, oni povos studi estontece, kiam mi estos finfarinta ilin, kaj ili eldoniĝos.

*De parolo dum la 82-a naskiĝtago de Martinus, 1972-08-11*

**Notoj**

1. Rilate la nehumanan kaj la humanan paradizon, vidu tekstojn el la libreto no 25 ”La vojo al paradizo”, ĉapitro 50-52.

3. Kutime Martinus uzis la esprimon ”la unua sfero” por kaj la purgatorio kaj la paradiz-zono.

6. Dum sia parolo de la 82-a naskiĝtago Martinus montris krom la aktualan simbolon no 96 ankaŭ la simbolojn no 38, 74 kaj 85, kiuj en 1972 ankoraŭ ne estis eldonitaj.

La teksto estas el La Eterna Mondbildo 6, eldonita en la dana kaj sveda en 2015. Esperantigis ĝin Hokan Lundberg.

# Tra purgatorio kaj paradizo – I



de Martinus

**1. La vera estulo malantaŭ la fizika organismo estas spirita estulo**

Kiel konate la morto konsistas el tio, ke la fizika organismo disiĝas de la psika estulo kaj mio, al kiu ĝi estis ligita. Ĉar nur estas la fizika organismo, kiu estas videbla por fizikaj sensoj, dum la psika parto ne estas atingebla por la menciitaj sensoj, ne estas tiel strange, ke tio, kion ni fizike povas vidi, disfalas, iĝas kadavro kaj dissolviĝas. Kaj la homo tiam dum certa stadio iĝas viktimo por la superstiĉo, ke la koncerna estulo estas morta, neniigita aŭ plene ĉesis ekzisti. Sed tio ja validas nur por la pense ankoraŭ nepreta estulo. La vere pensanta estulo ja antaŭ longe jam komprenis, ke tio, kio ekzistas krom la fizika organismo de la estulo, neniam rekte estis vidata kaj pro tio kompreneble ankaŭ ne povas videbli, kiam tio, kio kutime estas videbla de la estulo, disiĝas for de tiu ĉi. La vera estulo ja estas tiel nomata spirita estulo, kio signifas estulon, kiu aperas en psika konstruo aŭ organismo, kiu povas esti simbolita helpe de radio-ondolongoj kaj simile. Tiu ĉi strukturo sekve povas tute bone ekzisti en ligita strukturo, eĉ se ĝi ekzistas en radiforma materio.

**2. La pensointerŝanĝo inter la fizika kaj psika sferoj**

Danke al tiu ĉi psika strukturo aŭ nia spirita korpo ni do transvivas la morton, kiu ne estas iu morto, sed nur disiĝo de la fizika korpo. Ĉar la fizika korpo nur estas ilo por la konscio kaj ne estas la konscio mem, ni ne perdas tiun ĉi konscion, eĉ se ni perdas la fizikan korpon. Ni do plue povas pensi kaj sperti, ni plue povas ĉirkaŭvojaĝi kaj konstati spertojn kaj faktojn, sed ni nur ne povas plue en ordinara maniero realigi ilin en fizika materio. Ni nur povas realigi ilin en spiritaj okazaĵoj, kio signifas pensojn, ideojn kaj imagojn. Se ili transformiĝu al maldorma, fizika tagkonscio, tio nur povas okazi kiel pensotransdonado aŭ vizio. La nerekta maniero, kiun oni en la fizika sfero estas devigita uzi ekzemple per parolo aŭ skribo, tiu ne ekzistas en la spirita sfero.

Ĉar la fizikaj homoj ne povas uzi rektan pensotransdonadon de individuo al individuo en ilia maldorma, fizika stato, tiu ĉi formo de pensotransdonado nur povas okazi kiam la individuo ne estas veka, ne estas fizike tagkonscia. Ĝi povas ricevi tiajn transdonitajn imagojn aŭ pensojn, nur kiam ĝi dormas. Kiam la fizika korpo dormas, la estulo pro tio estas en intensa, rekte psika pensointerŝanĝado kun estuloj en la psika sfero, same kiel ĝi ĉi tie ankaŭ en responda maniero rekte sentas la realon en ĝia psika formo – ne la fizika. Ni tute bone povas sonĝi kaj travivi vojaĝon ĉirkaŭ la mondo, eĉ se ni kuŝas senmovaj en nia lito.

**3. La nuboj kaj sunlumo de la psika sfero**

Sed simile kiel la fizika mondo havas siajn nubojn, kiuj mallumigas la

sunlumon, tiel ankaŭ la spirita mondo havas siajn nubojn, kiuj pli aŭ malpli mallumigas la spiritan lumfonton. Ĉi tiuj nuboj estas la malobservoj de la vivleĝo aŭ amoleĝo fare de la viva estulo. La lamentado, milito kaj larmoj, kiuj ĉi tie okazas, kreas en la spirita sfero mallumigon de la vivo. En la sama maniero la perfekta plenumiĝo de la leĝoj fare de la vivaj estuloj kompreneble kreas respondan atmosferon de ĝojo kaj feliĉo en la psika sfero, kio signifas la plej klaran mensan sunlumon, la radiantan, lumantan kaj brilantan psikan someron aŭ grandegan pentekostan briladon super la vivo.

Kun ĉi tiuj faktoj kiel elirpunkto eblas doni al la fizikaj, maturaj estuloj malgrandan antaŭvidon de tiu mondo, en kiu ili en la realo vivas, sed kiun ili nur sentas en fizika maniero, kio denove estas la samo kiel nerekta vivspertado. Malantaŭ la fizika mondo, malantaŭ la fizika estado ekzistas do tute alia formo de vivspertado.

**4. Ni nun sekvos kvin personojn de la Biblio tra la morto, la purgatorio kaj la paradizo**

Ni nun provos doni malgrandan impreson de tiu ĉi reala mondo ekzistanta malantaŭ la fizika mondo per sekvado de kelkaj estuloj ĉi tie en la fizika sfero, kiuj estas mortontaj. Ĉar ni konas la psikon de ĉi tiuj estuloj, ni havos la eblon vidi, kiamaniere la spirita estadformo formiĝos por la aparta psiko, kiun ili ĉiuj unuope havas. Ili ĉiuj reprezentas apartan en la terhom-mensa sfero ekzistantan konscispecon. Kiam mi elektis ĉi tiujn apartajn estulojn de la religio kaj de nia infaneduko konatajn figurojn, estas pro tio ke, ili reprezentas la konscispecojn aŭ spiritajn statojn kaj sintenojn, kiuj estas eblaj por moderna terhomo, kaj kiuj stampos lian psikan aŭ spiritan estadon, kiam li estos perdinta sian fizikan korpon.

La estuloj, kiujn ni sekvos, estas kvin personoj, kiujn ni konas de la Biblio. El ĉi tiuj, kvar mortis en nenatura aŭ nekutima maniero, dum la kvina mortis nature. Ĉi tiuj kvin personoj estas la du rabistoj sur la krucoj, la Mondliberiganto, la sinmortiganto Judaso kaj la disĉiplo Johano. Ni nun sekvu ilin tra la morton, tra la purgatorion kaj la paradizon.

Tri el la ĉi tie menciitaj personoj mortas en nenatura maniero per krucumado aŭ ekzekuto.

Du estis ŝtelistoj, rabistoj kaj murdistoj, dum la tria estis homo kun alta moralo, amo kaj saĝo. Ili ĉiuj pendis sur kruco kaj estis kiel menciite mortantaj. Dum ĉi tiuj tri homoj en la pure fizika realeco estis submetitaj al la sama sorto, la sama suferado aŭ torturado, ni tamen vidas, ke ili ĉiuj aparte spertas sian samspecan situacion tute malsame.

**5. La sento de martireco kaj venĝemo de la unua rabisto**

Ni komencas pri la unua rabisto. Temas pri li, kiu kraĉante krias al Jesuo, ke se li estas Kristo, tiuokaze li liberigu ilin ĉiujn tri. Ni vidas en la psiko de tiu ĉi rabisto, ke li simile kiel multaj aliaj homoj senescepte nur pensas pri si mem. Ke li kaj Kristo povu ricevi la saman liberiĝon, estas laŭ li tute nature. Danke al tio iĝas nerekte klare, ke la rabisto sentas sin martiro. Li ne povas vidi, ke liaj propraj agoj, liaj murdoj kaj torturoj al aliaj, gvidis lin en la saman situacion. Li tute forgesas, ke tiuj, kiuj iĝis viktimoj de lia rabestulo, absolute ne ricevis indulgon aŭ kompatemon, sed iĝis kruele rabitaj ĝis la haŭto kaj poste vunditaj kaj detruitaj, se ili ne jam estis mortbatitaj. Li mem havas neniun pardonemon, sed tamen li vokas pri tio, ke aliaj pardonu lin. Sed la vivleĝo estas tia, ke neniu povas ricevi pardonon pri io sen tio, ke ili pardonas al aliaj. Tia rabisto koleregos al siaj ekzekutistoj,

tiel longe kiel li havos fortojn iom moviĝi. Li ne forgesus ekigi furiozan venĝon aŭ rebaton, se li liberiĝus.

**6. En la purgatorio: la imagoj de la rabisto pri eterna turmentado kaj fuĝo de la venĝo de la viktimoj**
Ju pli la morto proksimiĝas des pli granda fariĝas lia timo kaj angoro pri tiu ĉi morto. Jes, la timo pri la morto tiom multe okupas lin, ke li fakte tute ne rimarkas la mortomomenton, kiam lia fizika korpo disiĝas de lia spirito aŭ psiko. En la pensoj li plue krias, malbenas kaj minacas siajn ekzekutistojn kaj la socion. Sed samtempe li ne povas vidi tempofinon. Li eĉ ne havas tiom da paŭzo de la venĝopensoj, ke li povas rimarki, ke li jam liberiĝis de la kruco. Li pensas, ke li daŭre pendas sur la kruco, ĝis aliaj fantaziaj turmentoformoj afliktas lian animon. Ĉar li nun estas tute libera de sia fizika korpo, la pensoj fluegas libere kaj li vidas siajn viktimojn, li vidas iliajn timojn kaj aŭdas iliajn kriojn. Li imagas, kiel ili planas venĝoatakojn kontraŭ li. Li sentas, ke li fuĝas, sed nevidebla forto malebligas al li fuĝi. Tute malrapide kaj turmente la persekutantoj proksimiĝas, kvazaŭ li vidas nevenkeblajn barilojn antaŭ si. Li fuĝas flanken kaj renkontas ĉi tie aliajn neatenditajn barilojn, kaj tiel li vivas en ŝajne eterna fuĝo for de venĝoj de siaj viktimoj. Ŝajnas ke la tago neniam finiĝos. Li opinias, ke ĉiam estas la sama horo, se li entute havas tempon pensi pri la tempo. Samtempe aperas la imago al li pri eterna turmentado, eterna infero: ”Eterne, eterne vi vivos en fuĝo for de la venĝo de viaj viktimoj.” Li kuras kaj kuras, falas, ŝvitas, spiregas kaj ĝemkrietas. Manĝon li ne havas tempon ĝui. La persekutado ne ĉesas eĉ dum sekundeto. Ĉio, kion li tuŝas, ŝajnas esti venena, ŝajnas esti en komploto kun la malamiko.

**7. De la purgatorio tra la spiritaj mondoj reen al nova naskiĝo en la fizika mondo**
Finfine tiu ĉi fuĝanto vokas el sia koro, el sia propra malbona konscienco, en sia angoro al la nekonata Providenco. Kaj samgrade, kiel en tiu ĉi voko estas enmiksita komenciĝanta kompreno pri la suferoj de siaj viktimoj, la persekutado ĉesas, la mondo lumiĝas kaj la gardanĝeloj venas al li renkonte kaj komencas helpi lin. La helpo konsistas el liberigi lin de lia malbona konscienco. La vivdetruaj pensoj iĝos forsugestiitaj, kaj tio kio restas estas la malgranda parto de lia konscio, kiu agas direkte al simpatio aŭ amo. Kaj eĉ se li ĉi tie havas tre malgrandan agadliberecon, pro tio ke li ja ne evoluigis ian apartan talenton en tiu direkto en la fizika sfero, li tamen havos sian malgrandan konscion plenigita per beato. Sed li tre rapide trairas la pli altajn sferojn, kiujn li vidas nur kiel mirindajn lumterenojn, por de tie eniri sian propran internan mondon, la beatoregnon, de kie li naskiĝos denove en tiun medion kaj kun tiuj premisoj, kiujn li en sia pasinta vivo kreis por si, antaŭ ol li mortis. Ĉi tie li do denove komencu venki la timojn per propra luktado. En la spirita mondo li ne supervenkis ilin, li nur portempe liberiĝis de ili.

La veran liberiĝon oni mem per siaj propraj fortoj akiru en la fizika sfero. Per la malsukcesoj, spertoj kaj suferoj kiujn oniaj propraj agoj kreas, oni ja iĝas pli kaj pli saĝa kaj malkovros finfine, ke oni ne murdu aŭ vivu je kosto de aliaj, sed ke oni vivu nur por servi. Tiel la vivo iĝas luma kaj dieca, kaj fizike kaj spirite.

**8. La alia rabisto sur la kruco**
La alia estulo ankaŭ estis rabisto, sed li estis pli evoluinta ol la unua. Li komprenis, ke la Mondliberiganto ne estis unu el ili kaj pro tio ne devus pendi sur la

kruco. Li ja riproĉis la unuan rabiston, pro tio ke li primokis Kriston. Lia penso tamen enhavis multe da ĝusta aŭ ama sinteno, kaj li komprenis, ke Kristo apartenis al pli alta kaj pli bona regno ol la rabistoj, kaj pro tio li petis lin pensi pri li, kiam li venos al sia regno. Kristo tial diris al li: ”Hodiaŭ vi estos kun mi en paradizo.”

Imagu, de kio la rabisto estis liberigita. Jam antaŭ ol li mortis, li estis liberigita de la purgatorio kaj povis post la disiĝo de la fizika korpo ĝoje transiri al tiu zono, kiu estas adaptita al kaj la spirita hejmloko de tiuj ĉi malgrandaj spiritoj, kaj de kie ili denove povas naskiĝi al pli alta kaj pli bona medio ol tiu, kiun ili forlasis.

**9. La sinmortiganto Judaso**

Kiel la sekva ni venas al la sinmortiganto Judaso. Ni scias, ke li pro malesperego mortigis sin mem. Lia kulpo al sia amata Majstro aŭ Mondliberiganto tiom pezigis lin, ke li ĉi tie en la fizika sfero vidis sian vivon detruita. Li ne povis aliri la Mondliberiganton. Li ja estis ĉirkaŭita de tre armita potenco. La pensoj de Judaso pro tio tertremece turniĝis. Li ne plu volis vivi. Li ne meritis vivi en sfero, en kiu li forprenis la eblon por la Mondliberiganto ekzisti.

Sed post sia sinmortigo li malkovris, ke nun vere estis freneza situacio. Ĉi tie li vidis, ke oni ne povas fari ion bonan prenante sian vivon. Kaj ke la mio en la realo estas samnivela murdanto, kiam ĝi mortigas sin mem, kiel kiam ĝi mortigas iun alian. Kaj la turmentoj densiĝis al mallumaj kaj pezaj nuboj. Ĉirkaŭ si li havas aliajn sinmortigantojn. La estadloko konsistis el truoj kaj grotoj, ŝlimecaj, malsekaj kaj nebulaj terenoj, en kiuj ne estis aliaj lumfontoj ol la griza krepusko, kiun la malkontentaj aŭreoloj sume povis elradii. Larmoj, ĝemoj kaj malespero estis la ĉiotrapenetra atmosfero.

**10. Judaso volis anticipi la Providencon**

Sed Judaso ne estis malbonanima, li ne estis rabisto, li ja estis disĉiplo de la Mondliberiganto. Sed li volis anticipi la okazaĵojn. Li opiniis ke la okazaĵoj ne antaŭeniras sufiĉe rapide. Li pro tio volis iom akceli la mondliberigadon. Li volis, sen ke li vere sciis kion li faras, antaŭiri Nian Sinjoron – kaj ĉi tie malsukcesis. La volo de Dio ja sukcese aranĝas la mondotuton. Tion li estus kompreninta, se li estus aŭskultinta pli bone la Mondliberiganton, kiu ĉiam prezentis la volon de Dio kiel la absolute gvidan. Sed nun la malfeliĉa disĉiplo stiris sin malsupren en mensan abismon. Sed la pento kaj la amo al la Mondliberiganto estis du grandegaj faktoroj en la liberiĝo. Li ne povis de ĉi tie veni al la Majstro, sed la Mondliberiganto ne forgesis sian malfeliĉan disĉiplon, li venis al Judaso. Kaj Judaso liberiĝis de la turmentoj de la purgatorio, de sia propra konscience malluma pensopezaĵo, kaj estis levita kun la Majstro al pli altaj sferoj, al agrablaj sunriĉaj regionoj, kien li jam gvidis unu el la rabistoj. Kaj de ĉi tie Judaso estis naskita denove al la mondo kaj daŭrigis sian disĉiplecon en la servo de la mondliberigado.

**11 La disĉiplo Johano**

Restas la amata disĉiplo Johano, kiu dum sia paca morto esprimis kaj manifestis la plenumiĝon de la mesaĝo de la Majstro: ”Infanetoj amu unu la alian”. Por li ne estis iu purgatorio. Li estis homo, kiu senescepte vivis por stimuli ĉiujn ami ĉiujn kaj mem estis plenigita de tiu ĉi plej alta forto de la vivo aŭ la de la universo propra ondolongo aŭ baztono. Por tia estulo la transirado estas tre facila. Li tuj iris al sia hejmloko en la ĉielo, kie li en kunligo kun sia amata Majstro povis pluiri en la travivado de la mirindega mondo de Dio.

### 12. La Mondliberiganto transdonas sian spiriton en la manojn de la Patro

Fine ni do havas la iradon de la perfekta aŭ preta homo tra purgatorio kaj paradizo. Ĉar la Mondliberiganto jam ĉi tie en la fizika sfero estis tagkonscie maldorma en la spirita mondo, ne ekzistis por li iu morto. Simple estis demando pri la korpa doloro. Kaj pro tio, ke li mortis en nenatura maniero per krucumado, ni aŭdas lin krii: ”Mia Dio, mia Dio, kial vi forlasis min?” – Tio do estis la momento de disiĝo de la konscio. En la venonta momento la Mondliberiganto estis liberigita de ĉiaj teroanimalaj ligoj. Kaj ni vidas tiam ankaŭ, ke de la Mondliberiganto nur elradiis mensa lumoamasego de tia kapacito, ke ĝi daŭre hodiaŭ trembrilas ĉirkaŭ la tero en ĝia radiaŭreolo kaj lumosfero: ”Patro, pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras. Nun estas plenumita. En viajn manojn mi ordonas mian spiriton.”

Iujn pli grandecajn kaj lumantajn diecajn vortojn oni ne povas imagi kiel lastan lumantan adiaŭon al siaj malamikoj en la fizika mondo. Ke li en la sama enspiro prenas amikon kun si en sian radiantan travivsferon aŭ paradizon, ĉi tie iĝas memkomprenebla. La pura kaj altigita konscienco kaj paco, kiujn li okupis, ekzistis nur baze de lia granda amo al ĉio kaj ĉiuj, same kiel li ja plene transdonis sian spiriton en la manojn de Dio. Tiel ne plu ĉeestis iu timo aŭ mortotimego. Estis do paco kaj trankvilo, kvankam la morto ĉi tie estis nenatura morto, la fizika organismo ja tute ne estis trouzita aŭ malnova, sed aperis en sia plena vireco. La lasta, kion ni vidas de la menso de la Savanto, estas lumaŭrelo, kiu kapablis ĵeti sian rebrilon tute tra la tempoj ĝis niaj tagoj.


### 13. Por la inicita estulo, kiu estas unu kun la Patro, la grandega regno de Dio kuŝas etendita

Poste tiu ĉi estulo iris kiel enorma sunestulo tra la mallumaj labirintoj de la purgatorio al la turmentataj kaj la perditaj spiritoj. Kaj tra la spaco aŭdiĝis: ”Venu al mi ĉiuj Vi, kiuj estas ŝarĝitaj, kaj mi donos al vi ripozon.” Kaj ĉi tie inter multaj aliaj li renkontis Judason, kiu estis tiom kulpoŝarĝita, ke li ne kuraĝis proksimiĝi al la Majstro. Kaj en la spaco resonis denove la ama voĉo: ”Mi venis por serĉi kaj beni la perditajn”, kaj miloj da malfeliĉaj, sed pentantaj spiritoj flugis kun Jesuo supren kontraŭ belaj sferoj de lumo al por ĉiuj aparte taŭgaj hejmoj, en kiuj ili en la lumo restadis nur ĝis kiam ili denove estu ligitaj al la fizika sfero.

La unua rabisto venis al sia hejmo aŭ sia paradizo, kaj la alia rabisto al pli granda. Judaso venis al sia paradizo, kaj Johano venis al sia. La Mondliberiganto same venis al sia paradizo, kio signifas senescepte ĉiujn sferojn de la spiralo. La tuta grandega regno de Dio kuŝis alirebla por li, la inicita estulo, kiu estis unu kun la Patro. Sed tiel estas ne nur por Kristo, sed por ĉiuj aliaj inicitaj estuloj. Kristo sekve estas ekzemplo de tiu ĉi difileca stato.

La artikolo estas reproduktado de manuskripto, kiun Martinus verkis kiel prepariĝon por prelego donita en la Instituto de Martinus, dimanĉe la 20an de februaro en 1949. La prelego estas la dua en la prelegserio ”La mortomistero”. Kontrolado kaj rubrikoj estas faritaj de Torben Hedegaard. Aprobita de la konsilio en 2013-10-27. La artikolo aperis unuan fojon en dana Kosmos no. 2 en 2014. Esperantigis ĝin Hokan Lundberg.

# Tra purgatorio kaj paradizo – 2, la partoj 5-16



de Martinus

**5. La unua rabisto sur la kruco estis sur evoluŝtupo simila al tiu de naturhomo**
Rilate la unuan rabiston sur la kruco, li do liberiĝis de la purgatorio pere de gardanĝeloj kaj povis eniri la lumon. Sed pri kia lumo temis? – Viro, kiu nature estas rabisto kaj murdisto ĉi tie en la fizika sfero, ja estas primitiva estulo, kio signifas estulon, kiu enkarniĝis en la sferon de la kulturhomo, ne pro komuna religio aŭ moralsento, sed nur pro la altiro al la aparte oportunaj aŭ teknike multe pli bonaj mortigmetodoj. Kio estas mizera tomahoko aŭ pafarko kompare al la modernaj protektarmiloj de la kulturhomo kaj ĉiuj aliaj rafinaĵoj en tiu ĉi kampo. Kiam tiaj estuloj naskiĝas en la sferon de kulturhomo sole pro tiu ĉi avido, sed ankaŭ ne finspertis la malpli altan moralon de naturhomo, tiam ĉi tiuj estuloj ne povas adaptiĝi al la juraj leĝoj de la moderna socio kaj estas ĉie tie vidataj kiel ”krimuloj” kaj estas punitaj. Tia estulo estis do la unua rabisto sur la kruco. Tia estulo ne povis vidi ion malbonan en sia aparta vivmaniero. Por li la plej alta idealo estis, ke ĉiu por si mem estas la plej kara. Tiel ja estis la natura vivo kaj la natura moralo en liaj antaŭaj estadoj. Kaj pro tio ke li en la fizikaj vivoj, dum kiuj li estis enkarniĝinta en la sfero de la naturhomo, ankoraŭ ne havis la eblon ŝanĝi ĉi tiun sian moralon, li tute ne povas ricevi paradizon en sama sfero kiel la kulturhomo.

**6. La eldorado de la rabisto**
Ĉar tia estulo ja ne estas iu krimulo por Nia Sinjoro – la Providenco ja scias, ke neniu estulo povas reprezenti pli altan evoluŝtupon ol tiu, kiun ĝi atingis – do oni ne pensu ion alian ol tio, ke ankaŭ tia estulo ricevas sian paradizon, sian lum- aŭ ĝojtravivaĵon. Kia do estos ĉi tiu ĝojtravivaĵo? – Ĝi iĝas simple eldorado de rabisto. Kiam li estas trairinta sian koleratakon kaj malamon kontraŭ la socio, li venas al psike natura stato, kiu estas taŭge alĝustigita al tiu formo de spertado, je kiu li povas senti ĝojon pri la ekzistado. Ĉi tie li rajtas ĉasi aliajn estulojn, fari siajn rabegojn per modernaj armiloj, vere fari tion, kion li sur la tero ne plu havas iun ajn eblon povi travivi. Li murdas kaj mortigas ĉi tie, tio estas por li sporto. Li daŭre estas en ia Valhala sfero, en kiu tio ĉi pri vivi kaj morti sen batalo nur povas esti spertata kiel vivo por malfortuloj, malliberuloj aŭ sklavoj. En tiu ĉi paradizo de la mortiga principo la rabisto travivas sian paradizon. (Ĉi tie oni devas memori, ke ĉio ĉi okazas en lia fantazio. La fizika morto ne ekzistas en la spirita sfero.)

**7. La suferoj en la fizika mondo nobligas la menson de la rabisto**
Sed tiel la vivo ne povas pluiri. La fantazio estas tiom malgranda kaj kun tiel malmultaj varioj, ke li baldaŭ komencos senti sin laca. La similaj travivaĵoj iĝas kliŝoj, kaj li eksopiras al ŝanĝo.

Kaj tra la nekonscia ekstazostato de la beato li trairas la pli altajn sferojn en por li alĝustigita lumo, nome la veran homregnon, la saĝoregnon kaj la dian mondon, por vekiĝi en la beatoregno, lia propra memormondo. Ĉi tie li vidas siajn travivaĵojn en formo de lumantaj memoroj, kiuj igas lin eniri novan ekstazon forme de ĝojo pri la fizika mondo. La mallumaj memoroj estas daŭre kovritaj. Ilin li ne memoras. De ĉi tie li do estas kondukata reen al la fizika mondo en tiun medion kaj tiujn kondiĉojn, en kiuj li dum sia pasinta tervivo estis envolvita antaŭ sia morto. Kaj ĉi tie komencas do liaj naturhomaj sopiroj denove aperi, kaj li denove ekhavas konflikton kun la leĝoj de la socio kaj ricevas punon kaj denove punon kaj ili estas ligitaj al suferoj kaj problemoj, kiuj fine influas lian menson kaj moralan senton. Per la suferoj li iĝas plinobligita, ekhavas pli kaj pli da kompato al siaj viktimoj, iĝas religia en humana aŭ kristana direkto. En tiu ĉi maniero liaj revoj ŝanĝiĝas al pli humanaj formoj, kiuj denove stampas lian paradizan aŭ spiritan estadon, tiel ke lia paradizo ĉi tie post la morto en responda grado iĝos humana. Li ricevas pli kaj pli grandan deziron ludi defendanton, heroon, kiu savas aliajn homojn de ŝtelistoj, rabistoj k.s.

### 8. La alia rabisto sur la kruco ricevas plenumiĝon de sia revo en sia paradizo

Imagon de tiu ĉi lia nova stato ni ricevas per la alia rabisto sur la kruco. Li ja jam havis tiom da humanismo, ke li opiniis maljusta tion, ke la Mondliberiganto, la senkulpa estulo sur la kruco apude, estu punata aŭ turmentata, dum li opiniis justa tion, ke li mem kaj ankaŭ la alia rabisto estu punitaj. Jes, ni vidas, kiel li riproĉis la unuan rabiston, same kiel ni ankaŭ vidas, ke li sopiras al alia paradizo, al alia kaj pli bona estado. Li ja metas sian plej grandan deziron, sian plej profundan senton en sian preĝon al Kristo, tiam kiam li diras: ”Mastro, pensu pri mi, kiam vi venos en vian regnon.” Kaj ni ja scias, ke Kristo anoncis al li la plenumiĝon de lia deziro per ĉi tiuj vortoj: ”Hodiaŭ vi estos kun mi en paradizo.”

Kia estis do tiu ĉi paradizo? – Tiu ĉi rabisto ricevis do plenan pacon en sia menso, antaŭ ol li mortis. Liaj noblaj pensoj pri Kristo, kune kun lia peza sento pri siaj kulpoj, estis tiel forta enpuŝado de pli alta energio, ke ĝi portis tiun ĉi rabiston al tiu por li komprenebla kaj sekve ĝojiga paradizo. Kio povus esti ĝojiga por tia rabisto, kiu estis en tre alta grado malkontenta pri si mem kiel rabisto. La paradizo, kiun lia amiko travivis, ja tute ne povus doni al li ĝojon. Ne, li havis la eblon provi esti heroo en la estado, kiu por li iĝis revo. Li spertis sin mem kiel mastro super sia senco, spertis supervenki ĉiun emon mortigi aŭ murdi, jes, li eĉ rajtis sperti sin kiel bona samariano, kiu helpis ĉiujn, kiuj estis faligitaj de la rabistoj. Li ricevas la ĝojon prizorgi kaj flegi ĉiujn de la rabistoj vunditaj estuloj, helpi al ĉiuj, kiuj estas persekutitaj. Li sentas sin brile feliĉa, ĉar li troviĝas en la kulmino de la plenumiĝo de ĉiuj siaj revoj. Sed li povas facile esti bona samariano ĉi tie, kie ĉiuj pli malaltaj kaj ankoraŭ ne venkitaj mensaj aŭ psikaj aperaĵoj estas fortenitaj danke al organlamado per sugestio de la gardanĝeloj kaj tiel ne detruas lian fantazion.

### 9. La paradizspertoj iom post iom iĝas mortaj kliŝoj

Ĉar li nur povas sperti la statojn, kiujn lia fantazio povas krei, liaj travivaĵoj iĝas ankaŭ ĉi tie fine limigitaj al multaj ripetadoj de la samaj travivaĵoj. La travivaĵoj perdas iom da intereso, iĝas mortaj kliŝoj, jes iĝas tedaj, kaj ekde tiam la estulo jam survojas for de tiu ĉi sia paradizo. Sed per sia pli nobla

aŭ humana sinteno ĝi ricevas dum sia pasado tra la pli altaj sferoj eblon sperti iomete de la unuaj zonoj de la vera homregno. Sperti tion, kio en la fizika sfero estas la granda idealo por la ter-homoj. Kaj per tiu ĉi sperto ĝi eniras nekonscian ekstazon, kaj en tiu stato ĝi preterpasas la saĝomondon kaj la dian mondon por vekiĝi en sia propra me-morsfero aŭ la beatoregno, de kie ĝi do denove naskiĝos al la fizika mondo en tiun medion kaj cirkonstancojn, kiuj ĉi tie estos kongrua kun ĝia evolupaŝo kaj sorto, ĝia revo pri pli bona fizika estad-formo.

**10. La sinmortiganto Judaso**

Kaj nun pri la sinmortiganto Judaso. Kiam ĉiu mallumo estis forsugestiita aŭ forigita de la psiko de Judaso, kio do restis? – Jes, lia revo ja estis vere esti disĉiplo de Jesuo. Li nun rajtas sperti la ĝojon per ĉiu tiu idealismo kaj per-fekteco de disĉipleco, kiujn li ne povis praktiki sur la tero pro la potenco super si de liaj propraj ideoj anstataŭ tiuj de la Mondliberiganto. Sed ĉi tie, kie li cent-elcente transdonis sian vivon al la Savanto kaj la mondliberigado, li rajtas sperti, kiel la vivo kaj la homaro formos sin, kiam la granda saĝo kaj kondut-maniero de la Mondliberiganto estos praktikataj. Li travivas tion ĝis la plej alta formo, kiom lia fantazio ĉi tie povas manifesti. Lia spirito pleniĝas per ĉiu tiu energio, kiu estas sankta. Kaj en tiu ĉi sankta energio li pluiras, rajtas enrigardi en la zonojn de la vera mond-regno, tie, kie oni jam de longe atingis vivi en kontakto kun la leĝo de la prok-simula amo. Kiam lia fantazio estas elĉerpita, la bildoj forglitas kaj enorma ekstazo portas lin tra la saĝomondon kaj la dian mondon por denove vekiĝi en sia propra tagkonscia memorsfero, de kie li do naskiĝos reen en medion kaj sferon, en kiu li povos servi la Savanton kaj la mondliberigadon, kiujn li dum sia pasinta vivo en sia fanatikeco kaj mem-konfido iom detruis.

**11. La disĉiplo Johano, kiun ”la Sinjoro amis”**

Nun temos pri la disĉiplo Johano. Pri li ni scias, ke li male al la aliaj estuloj, kiujn ni menciis, havis naturan mor-ton, kio signifas morton aperanta pro maljuneco. Ni ankaŭ scias, ke li estis portretita kiel la disĉiplo, kiun Jesuo amis. Tio kompreneble ne signifas, ke li estis favorata pli ol la aliaj disĉiploj, ĉar la Mondliberiganto aŭ la amo de inicita estulo kovras ĉiujn kaj ne konas favoradon. Sed tio tamen signifas, ke li estis tiu el ĉiuj apostoloj, kiu estis plej proksima al la plenumiĝo de la amoleĝo. Li estis disĉiplo, kiu supervenkis ĉiujn mallumajn difektetojn, koleremon, envion, ĵaluzon kaj malamon. Li estis tiu disĉiplo, kiu estis plej proksima al la mensa stato de la Majstro. Li povis nek mortigi aŭ vundi siajn kun-vivantojn. Pro tio ke similaj infanoj plej bone kunludas, ĉar ili plej bone interkompreniĝas, estas verŝajne, ke tiu ĉi leĝo validis ankaŭ inter la Mondlibe-riganto kaj jena disĉiplo lia. Ke Johano danke al sia ama sinteno povis komp-reni pli ol la aliaj disĉiploj, estas mem-kompreneble. Ke Jesuo same danke al la granda amo de la disĉiplo povis kon-fidi aferojn, kiujn li ankoraŭ ne povis malkaŝi por la aliaj, estas same mem-kompreneble. Ke ĉi tiuj du estuloj do havis multajn interparolojn por si mem aŭ estis multe kune, estas tute nature. De tio ĉi fontas la vortoj ”la disĉiplo, kiun la Sinjoro amis”. Ni scias, ke tiu ĉi amata disĉiplo tute ĝis sia morto insti-gis la homojn esti bonaj unu al la aliaj. Kaj kiam li estis maljuna kaj ne povis fari ion, li tamen flustris la vortojn: ”In-fanetoj, amu unu la alian”.

**12. La purgatoria sperto ne ekzistas por la tre evoluinta estulo**

Ke tiu ĉi estulo ne havas iun purgatorian sperton, ne havas ion forsugestiindan, estas evidente. Li tuj eniras sian paradizon. Ankaŭ lia sperto nun iĝas ĉiu beleco kaj amo, ĉiu humanismo kaj feliĉo, kiujn lia fantazio entute povas krei. Tiel evoluinta estulo ne havas iun malgrandan pensokapablon aŭ primitivan fantazion. Li vidas ĉi tie tute senprobleme, en aldone propra stimula atmosfero, la tutan homaron en la brilanta lumo, kiun la venonta mondliberigado unu fojon kreos. Li jam atingis tiom longe en trejnita fantazio, ke ĝi ne malhelpas lin travivi la sferon de la vera homregno, kia ĝi aperis sur aliaj planedoj, kiuj estis pli evoluintaj kaj pro tio sur pli alta ŝtupo ol la terglobo. Li ĉi tie ricevis prepariĝon por iniciĝo. Kaj de ĉi tie tiu ĉi apostolo de amo pluiris tra la saĝomondo kun iom da tagkonscio kaj ankaŭ kun tagkonscia parteto de la dia mondo por de tie, satigita je lumo, endormiĝi en ekstazo, de kie li denove tra la beatoregno vekiĝos en utero de patrino en nova fizika ekzisto, al medio kaj konscisfero, kie li povos ricevi kosman ekbrileton aŭ gradojn de iniciĝo en la fizika sfero kaj la el tio sekvantan klarigitan ekziston en fizika karno kaj sango.

**13. La radimondo de la Mondliberiganto brilas ĝis hodiaŭ super la teron**

Restas do la Mondliberiganto, kiu mortis sur la kruco. Ĉar li ja estis estulo, kiu jam atingis iniciĝon en pasintaj ekzistoj, li ja jam ĉi tie en la maldorma, fizika sfero estis tagkonscia en la spirita mondo. Pro tio lia morto iĝis granda lumomanifestiĝo, kiu ĵetas sian lumomondon, ne nur super la tiaman teron, sed ankaŭ al generacioj de jarcentoj, kaj kiu brilas ĝis hodiaŭ dum du mil jaroj kun sama forto super la teron. Sed homoj simple kutimiĝis al la lumo, kaj pro tio ĝi ne plu ŝajnas tiel forta. Ĉar tiu ĉi estulo estis inicita, kio signifas ke li estis kosme konscia en ĉiuj ses sferoj de la vivo, ĉi tie ne temis pri ia fantazia travivaĵo, sed pri travivaĵo de la realaj faktoj de la sfero. Li foriris kaj predikis al la spiritoj, kiuj estis deponitaj. Do al la malfeliĉaj spiritoj aŭ animoj en la purgatorio. Ni povas esti certaj pri tio, ke li ĉi tie aperigis enorme grandan inspiron kaj forton por ĉiuj tiuj gardanĝeloj, kiuj estis la helpantoj de la malfeliĉaj estuloj. Ke li ĉi tie pli ol en iu alia loko esprimis sian amon per la vortoj: ”Mi venis por trovi kaj beni la perditajn”, estas memkomprenebla. Ke li ĉi tie renkontas sian amatan disĉiplon kaj liberigas lin de lia turmento, estas same memkomprenebla. Kaj pasinte ĉiujn malfeliĉajn estulojn la Mondliberiganto pluiru, sed li ne forgesis siajn amikojn en la maldorma, fizika sfero. En tiu ĉi stato estulo povas, dum ĝi ankoraŭ estas tiel proksima al la materio de la tersfero kaj la fizikaj ondolongoj, materiigi sin, kiam aldone oportunaj kondiĉoj validas. Kaj la Mondliberiganto montris sin i.a. por siaj disĉiploj unufoje, kiam ili estis kune, kaj la pordoj estis ŝlositaj aŭ fermitaj por la judoj.

**14. Kristo kaj aliaj mondsavantoj ĉeestas en la fizika sfero per la lumaŭreoloj de iliaj konscioj**

Kaj post la pruvado por siaj amikoj en fizika karno kaj sango, ke oni tute bone povas ekzisti trans krucumado, trans karno kaj sango, kaj tiel konfirmi la senmortecon de viva estulo, la Mondliberiganto pluiris supren al la saĝomondo kaj la dia mondo kaj spertis ĉi tie, per maldorma tagkonscio, esti unu kun la Patro, la tuta dieca mondoplano kaj povis de ĉi tie konstante tra la etero sendi sian brilantan lumomondan inspiran forton malsupren tra la sferoj

al la tero, malsupren al la giganta lumarko, kiun li tie per sia saĝo kaj siaj eternaj vortoj kreis kaj postlasis. Tiu lumomondo estas io el la ondolongoj de la spirita mondo, kiu havas sian radikon en la fizika sfero. Kaj en la plej altaj tavoloj de tiu ĉi sfero troviĝas la Mondliberiganto, same kiel ĉiuj aliaj inicitoj aŭ estuloj kun kosma konscio, maldorme tagkonscie. Pro tio li povis diri: ”Kie du aŭ tri parolas kune en mia nomo, tie mi ĉeestas.” Kaj tio ĉi estas ĝusta. Li ĉeestas danke al la lumaŭreolo de sia konscio. Sed lia lumaŭreolo ja estas la materio de lia spirito. Kaj per la materio de lia spirito ja okazas lia manifestiĝo. Sekve ne estas maleble vidi Kriston, Budhon, Kriŝnon aŭ aliajn de la grandaj mondsavantoj, se oni povas ekhavi sufiĉan kontakton kun la aŭtentaj tavoloj de ilia konscio, kio signifas per la vera proksimula amo.

**15. Kristo kaj aliaj mondsavantoj ĉeestas en la fizika sfero danke al la lumaŭreolo de siaj konscioj. Inicitaj estuloj kutime ne enkarniĝas en la zonojn de la pli malaltaj mondoj.**

Sed Kristo aŭ aliaj inicitaj estuloj estas ĉiuj estuloj, kiuj finis enkarniĝi sur la tero kaj kutime ne plu enkarniĝas tie, ĉar ili simple elkreskis tiun ĉi planedon. Ili plene transiris la fizikan defion, kiun ĝi povas doni. Pro tio ili enkarniĝas en pli altajn fizikajn mondojn, sur planedoj, kiuj estas ĉefe por inicitaj estuloj. Temas do pri planedoj, kiuj jam hodiaŭ reprezentas la perfektajn fizikajn statojn, kiujn la tero ankoraŭ ne atingis, kaj kie la homoj pro tio devas vivi en militoj kaj suferoj. La kosmaj aŭ inicitaj estuloj ja povas jam de la spirita sfero aŭ en elkarniĝinta stato viziti ĉi tiujn mondojn, pro tio ke ili havas tiel altan spiritan atmosferon, ke ĝi venas je ondolongo kun la kosmaj sferoj. Kiam inicita estulo naskiĝas sur la tero, la celo sole estas disvastigi la sferojn de la pli altaj spiritaj mondoj en la terhoman konscion. Ili venas kiel misiistoj al zonoj de tiaj malpli altaj mondoj por gvidi per la proksimula amo la homojn antaŭen tra iliaj mallumaj sortoj, ĝis la perfekta kondutmaniero kaj la sekve ligita travivaĵo de senmorteco kaj Dio kaj ilia identeco kiel filoj de aŭ esti unu kun tiu ĉi plej alta fonto de la vivo.

**16. Neniu povas fari maljuste, neniu povas suferi maljuste**

Tiel mirindega do estas la vivo, ke ĉiuj ricevos sian paradizon. La eterna infero same kiel eterna perditeco estas nur mallumaj fantazioj de fizikaj estuloj. La samo validas pri la kredo je vera morto kaj neniigo. Neniu povas mortigi, neniu povas fari maljuste, kaj neniu povas suferi maljuste. Ĉiu spertado kuŝas en niaj propraj manoj. Kun tiu ĉi identeco kiel difiloj estas do ligita privilegio, ke ĉiu nia spertado, ĝia formo kaj amplekso, ĝia koloro kaj lumo, plene kuŝas en niaj manoj. La estado fariĝas ekzakte la malbono aŭ bono, la lumo aŭ mallumo, kiel ni mem kapablas alformi ĝin esti. Ni estas unu kun Dio kaj la eterneco malantaŭ la trembrilanta radimondo.

(Tradukis el la dana Hokan Lundberg.)

**La Centa Universala Kongreso de Esperanto kaj la Kosmologio de Martinus.**

La centa UK jam estas historio. Bela kaj memorinda. Neforgesebla por tiuj kiuj havis la ŝancon ĝui ĝin. La centa estis por mi la unua Universala Kongreso, la unuan fojon mi povis vidi kiel pli ol 2.500 homoj venintaj el pli ol 80 landoj de la mondo interkompreniĝas en la sama internacia kaj neŭtrala lingvo, Esperanto.

Kaj meze de tiu Esperanta kulturo, meze de tia internacia amikeca etoso, dum la Movada Foiro, brilis senbrue kaj silente la Kosmologio de Martinus. La 25-an de julio inter la 19:00 kaj la 21:00 horo en la granda halo ĉe la interetaĝo de la kongresejo la esperantistoj povis ricevi informojn pri la laboro de Martinus. Ili povis preni informilojn, revuojn Eo-Kosmos, kaj demandi pri la spirita scienco de Martinus. Estis tre interese vidi kiel esperantistoj pasas antaŭ la tabloj de la diversaj asocioj, grupoj aŭ movadoj, rigardante informilojn, aliĝilojn, broŝurojn, k.t.p., serĉante ion novan, kio kaptu ilian atenton. Inter 120 informbudoj centoj da homoj serĉas sen scii kion ili trovos. Ĉu "hazarde" iu el ili prenos la revuon Kosmos? Ĉu iu el ili ekinteresiĝos pri la spirita scienco de Martinus? Ĉu oni povas imagi, ke sur la tablo de unu el la 120 informbudoj, meze de centoj, miloj da homoj, kuŝas la solvo de la vivmistero, la Sankta Spirito?

"Saluton, ĉu vi konas la laboron de Martinus? Li estis dana verkisto de la pasinta jarcento. Lia verkaro estas spirita scienco pri la vivo kaj la universo..." Iom post iom esperantistoj pasas antaŭ la tablo de la Instituto de Martinus, rigardas la revuojn Kosmos, legas iomete, miras pri la simboloj, demandas ĉu ili povas preni unu kaj daŭrigas sian promenadon serĉante ion, kio kaptu ilian atenton. Kelkaj el ili jam scias pri la ekzisto de la verkaro de Martinus kaj unu eĉ legis ĝin. La laboro estas finita. Je la 21:00 horo oni devas lasi la tablon malplena kaj pura. La esperantistoj malaperas de la granda halo.

– En siaj manoj ili havas kosman semon, sed tion ili ne scias.

– En siaj manoj ili havas la solvon de la vivmistero, sed tion nur unu el ili scias.

Eble iam, post kelkaj jaroj, la semo komencos kreski en la konscio de kelkaj el ili. Kaj por ili tiam la centa UK estos ankoraŭ pli memorinda, bela kaj neforgesebla ol ili povas imagi nun.

*Javier Romero*

INFORMO PRI

## LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 3838 0100
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Hokan Lundberg
kaj Mathias Dalmose.
Kompostado: Dan Elhaûge.
La frontpaĝa bildo: © Martinus Institut

Unuopa kajero: DKK 40,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.

Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.

## La Hispana Kongreso de Esperanto kaj La Kosmologio de Martinus

Dum la pasinta hispana kongreso de Esperanto, kiu okazis en Cullera (Valencio), inter la 1-a kaj la 3-a de majo de 2015, la hispanaj esperantistoj povis aŭskulti pri la Nova Monda Kulturo kaj Esperanto (spektebla en Youtube). La prelego estis bazita de la verko de Martinus. Mi uzis la libron de Ole Therkelsen, "Nova Monda Moralo", kaj la artikolon "Naciismo kaj internaciismo" de Martinus por fari ĝin. La prelego tre plaĉis al la aŭskultantoj kaj post ĝi, ili demandis pri diversaj temoj rilate al la enhavo.

Estis la unua fojo ke oni prelegas en Hispanio pri Martinus en Esperanto. Sed mi esperas ke ne estu la lasta.

La venonta hispana kongreso de Esperanto okazos en Herrera del Duque, inter la 30-a de junio kaj la 4-a de julio de 2016, kaj mi esperas ke en tiu venontjara kongreso oni daŭrigu la disvastigon de la verko de Martinus inter la hispana esperantistaro. Estus dezirinde kaj ĝojdone ke multaj el ni povus partopreni en ĝi.

Pli da informo ĉe: http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso

El Hispanio, elkore
salutas vin

*Javier Romero*

